


**La 18an de junio 2015**

## **Sperto de du virinoj fuĝintaj en Hokajdon**

Antaŭ du jaroj mi prelegis en la ĉefurbo Sapporo de Hokajdo, la norda insulo, kaj tie mi renkontiĝis kun maljunulino. Ŝi ofte sendas al mi diversajn informojn pri Hokajdo. Inter ili estis raportoj pri la nuklea centralo Tomari en Hokajdo. Okazas proceso kontraŭ tiu nuklea centralo, kaj en ĝi du virinoj esprimis siajn spertojn kaj opiniojn pri la nuklea akcidento en Fukuŝima. Mi trovis tiujn tradukindaj.



### **Atesto de s-ino Honda Ĵunko**

Mi estas Honda Ĵunko. Mi fuĝis de la urbo Kagamiŝi situanta en la meza parto de la gubernio Fukuŝiman en la urbon Sapporo, Hokajdo. Tio, kio decidigis al mi fuĝi, estis sanmalnormaliĝo de mia filino.



En aprilo 2011, post la nuklea akcidento de Fukuŝima, mia filino 12 jara komencis viziti lernejon. Baldaŭ mi rimarkis, ke sur ŝia vizaĝo aperis ekzantemoj, kiujn mi neniam antaŭe vidis. Mi surpriziĝis kaj ni vizitis la kuraciston. Li diris, ke tiu ruĝaĵo ne estas impetigino. Poste mi sciis, ke post la nuklea akcidento en Ĉernobil

homoj kun malforta haŭto same suferis.

Mi telefonis al la lernejo, petante, ke la lernejo ne donu al la gelernantoj lunĉojn konsistantajn el produktaĵoj de Fukuŝima kaj ne permesu la lernantojn ludi ekstere, sed la respondo estis, ke tiuj lunĉoj kaj eksteraj agadoj de la lernantoj tute ne gravas, ĉar la registaro agnoskas tiujn sekuraj.

Mi juĝis, ke ni ne povos plu vivi en tiu situacio kaj decidis translokiĝi al Sapporo, Hokajdo. Miaj edzo kaj filino translokiĝis en junio, kaj mi en julio, ferminte mian beligejon. Mi amis mian urbon, mi laboradis tie diligente 15 jarojn, sed subite mi devis apartiĝi de la urbo, de la beligejo kaj la kolegaj beligistoj, amikoj kaj gepatroj. Bonordigante niajn posedaĵojn en la hejmo kaj rigardante fotojn de mia junaj gefiloj, mi fariĝis malĝojega. Kun larmoj mi demandadis min, kio kaŭzis al mi tiun malfeliĉon. Longe mi pensis pri tiuj aferoj, sed fine mi decidis agadi nur por sano de mia filino.

Mi unuan fojon vizitis Hokajdo-n. La vivo estas tre malfacila. Mia edzo havis novan laboron post kelkaj monatoj, sed la salajro estis nur 100 mil jenoj (unu mil eŭroj). Mi malfermis beligejon, sed ĉiun monaton mi suferis pro defecito. Unu semajnon poste mi fariĝis tiel laca, ke mia korpo malmoliĝis kaj ne povis moviĝi. Mi dormis la tutan tagon. Mi perdis memfidon dum tiu vivo.

Mia filo, kiu loĝas en alia urbo, ĉesis viziti kolegion, ĉar ni ne povis pagi lian lernopagon. Mia filino devis ekzameniĝi por supera mezlernejo en la fremda urbo. Kiel senhelpa ŝi estis! Ĉiuj suferegis korpe kaj mense ĝis la limo en fremda urbo kaj en tute malsama vivkondiĉaro. Ĉiuj kaŝe larmis, ne montrante larmojn unu al la alia.

Ni estas memvolaj rifuĝintoj, al kiuj TEPCO ne donas kompensan monon. Ni vivis per malmulta salajro kaj elspezo el la ŝparita mono. Ni

vendis nian aŭtomobilon, ni malmendis la asekuron, kaj unu jaron poste ni vendis miajn domon kaj beligejon en Fukuŝima.

Amikeco kun geamikoj kaj harmonio kun gepatroj rompiĝis, ĉar opinio kaj sinteno al raidoaktiveco malsamis. Mi sentis tiel fortan afliktiĝon, ke mi kolerege telefonis al TEPCO kaj kriaĉis, tamen poste mi havis peksenton pro mia maldececo.

Mi opinias, ke se mi estas silenta, la registaro kaj TEPCO ignoros nin kaj senkulpigos sin, tial mi akceptis ĉiujn intervjuojn de televid- kaj radio-stacioj kaj parolis en diversaj kunvenoj. Mi partoprenis ankaŭ en la proceso. Demandante min, kial mi devas agadi tiamaniere, kaj kial mi devas senti tiujn doloron kaj malĝojon, multajn noktojn mi ne povis dormi. Al aliaj homoj mi ridetis, sed en mia koro mi larmis. Mi sentis, ke mi frakasiĝos, se mi ne ridas. Pasis du jaroj kaj duono, kaj mia vivo iom stabiliĝis kaj iom mi povas ridi, sed estos ne eble vivi feliĉe samkiel mi estis en Fukuŝima.

Pri tiroida malsano la registaro tre malrapide agas, do mi mempage ekzamenigis mian filinon. Ŝia cisto pligrandiĝis ol en la lasta jaro. La kuracisto diris, ke tio ne gravas, sed mi ne sentas trankvilon.

Multaj homoj jam forgesis la katastrofon, sed mi pensas, ke veraj suferoj aperos de nun. Inter miaj amikoj jam 4 homoj eksedziĝis eble pro malsamaj opinioj pro radioaktiveco. Kiom da doloroj ili spertis? Tamen mi decidis ne plu larmi, ĉar kolero vundas miajn ĉelojn kaj ankaŭ la familianojn kaj amikojn ĉirkaŭ mi. Mi rifuĝis en Sapporo por savi mian filinon, do se mi malsaniĝos, mi ne povos savi ŝin. Pli ol vivi larmante, vivi ridante estas grave. Mi agadu kun rido, tion mi lernis el mia severa sperto. Tamen mi ne povas pardoni la registaron kaj TEPCO-n, kiuj rabis de ni trankvilon, timigas nin per radioaktiveco kaj neglektas niajn suferojn. Se ni, suferantoj, ne protestus kontraŭ ili, kiuj povus fari tion?

### **Atesto de s-ino Cuzuki Hiroko**

La 21an de julio 2011, kvar monatojn post la nuklea akcidento, mi forlasis mian hejmon kun miaj edzo kaj du gefiloj. Mi adiaŭis la gepatrojn, sed mi ne povis eldiri: “Ĝis revido!”, ĉar mia domo estas ĉi tie, sed mi ne sciis, kiam mi povos reveni ĉi tien. Mia koro ŝanceliĝis. Por deteni min de larmado, mi suprenvidis, kaj tie same kiel antaŭe estis la blua ĉielo, sed mi

sciis, ke ĉio jam ŝanĝiĝis pro la nuklea akcidento. Mi ne plu povas vivi trankvile samkiel antaŭe.

Ambaŭ mi kaj mia edzo naskiĝis kaj kreskis en Tokio. En 1995 miaj gepatroj, kiuj amas montojn, elektis la urbon Ŝirakaŭa kiel sian hejmon kaj translokiĝis. Dum ni vizitis ilin ofte, ankaŭ ni tre amis la urbon kaj translokiĝis tien en 1997. Miaj du gefiloj naskiĝis en la gubernio Fukuŝima, do ilia hejmloko estas Fukuŝima. Ni pasigis 14 jarojn en la urbo. Tiun tagon ni devis adiaŭi tiun urbon, postlasinte la gepatrojn kaj la karan domon, kio donis al ni grandan malĝojon.

La urbo Ŝirakaŭa estis 80 kilometrojn for de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Kiam okazis la akcidento, nur aŭdiĝis voĉoj: “Ĉi tie ne gravas”, “Neniu problemo okazos”, “Estu trankvilaj”. Mi ne povis konsenti al tiuj vortoj, ĉar la akcidento estis senprecedenca.



En aprilo la nova lernojaro komenciĝis. Mi proponis al la lernejo, ke oni purigu la sportejon kaj malpermesu al la lernantoj uzi ĝin, sed la lerneja respondo estis ĉiam sama: “Estas bone, ke la gelernantoj agu kiel kutime”, sed kontraŭdire la lernejo instrukiis,

ke la gelernantoj surportu maskon, longmanikan ĉemizon kaj pantalonon. Vidante miajn gefilojn viziti la lernejon ĉiun matenon, mi demandis min, kial la lernejo provas trudi al la gelernantoj “normalan vivon” en “malnormala situacio”.

En majo okazis Sporta Tago en la sportejo ankoraŭ ne purigita. Mi demandis la lernejestron, kial la lernejo okazigos Sportan Tagon en tiu situacio, kaj la respondo estis: “Se ni ne aprobus la normon de 20 milisivertoj jare deciditan de la registaro kaj la sportejo devus esti malpli poluita ol 1 milisiverton jare samkiel antaŭ la akcidento, morgaŭa Sporta Tago devus estis nuligita”. Aŭdinte tiun respondon, mi frakasiĝis pli ol koleriĝis. La lernejo taksis la regulojn pli alte ol la vivon de la infanoj. Tiun momenton mi decidis translokiĝon.

\*Tiutempe la ministerio de edukado kaj scienco decidis la normon de 20 milisivertoj jare al lernejoj, kvankam la ĝistiam (kaj eĉ la ĝisnuna) normo estis/as 1 milisiverto jare. Unu el la komisionoj, kolerante pro tiu decido, ekŝiĝis de la komitato.

Tiu nuklea akcidento vere okazis. El tiuj eksploditaj reaktoroj elflugis kvantego da radioaktivaĵoj kaj disvastiĝis ne nur en la gubernio Fukuŝima, sed ankaŭ al la tuta Japanio, poluigante la teron kaj aeron. Senodoraj, nevideblaj radioaktivaĵoj donis grandan influon ankaŭ al la koro de homoj. Rifuĝintoj estas ofte kritikataj kiel perfiduloj, kaj homoj restantaj en Fukuŝima estas ofte kritikataj kiel homoj ne zorgantaj pri siaj gefiloj. Amikoj kaj familianoj malharmoniiĝis kaj dividiĝis. Ambaŭ rifuĝintoj kaj restantoj perdis multon kaj ĉiam suferas pro manko en sia koro.

Paŝi antaŭen ne signifas simple forgesi la pasintecon. Kiam ni povas scii, kio okazis, kaj povas vidi, kio okazos, ni povas paŝi antaŭen. Mi volas scii veron.

Kial niaj homaj rajtoj estas neglektataj? Kial oni ne taksas nian volon protekti malfortajn infanojn? Kial neniuj respondeculoj en la registaro kaj TEPCO estas kulpigitaj, kvankam la akcidento estas farita de homoj? Ĉu ni, ordinaraj homoj, estas kulpaj pro la akcidento, ĉar ni estis malkleraj kaj ne havis intereson?

Mi deziras, ke per tiu proceso ni povu klarigi la respondecon de la akcidento kaj reakiri niajn homajn rajtojn kaj dignon por vivi feliĉe kaj sane.

Fine aŭskultu vortojn de mia filino, kiam ŝi estis 14-jara: “Estos bone se venos tempo, kiam mi povos ridi, konfirmante, ke nia rifuĝado ne estis necesa, sed se venos tempo, ke ni konfirmos nian rifuĝadon necesa, mi neniam povos ridi”. Vi bildigu kaj neniam forgesu tion, kion ŝi pensis, kiam ŝi eldiris tiujn vortojn.

**HORI JASUO**